

Kelkaj vortoj pri mia vivo

Naskita en 1923 en Reims, Champagne, Francujo. Simpla infanaĝo, kun pli juna frato. Baza lernejo: spertis eksterordinaran instruiston, kelkajn jarojn antaŭ ol eniri la liceon.

Mian vivon ekdirektis unu dissendo el Radio Parizo. Proponiĝis dekleciana Esperanta kurso. Tra la jaroj mi lernis ami ĉi tiun novan lingvon. Kiel ĉiuj aliaj lingvoj ĝi funkcias per la analogiaj ĝeneraligoj. Sed ĝia aŭtoro faris el tiu elemento la ĉefan bazon de Esperanto. El tio elfluas rimarkinda interna forto! Alia bazo de la lingvo estas la utiligo de radikoj kundisponataj de ĉiuj el la grandaj lingvoj!

Pluirante, mi ekkonis la diversajn nivelojn de la movado: loka delegito, membro de la loka komitato, prezidanto... Paralele, organizado de publika kurso, kiun mi funkciigas unu fojon semajne, en Reims, poste en Tuluzo. Prezidanto de la Sudopirenea Esperanto-Federacio. Prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto. Prezidanto de la Akademio de Esperanto, entute dum dek du jaroj.

Mi admiras Zamenhof, por kiu Esperanto estis senmanka kaj efika metodo por reunuecigi la Homaron ! Por atingi, ke la Homoj sin eksplicite rigardu kiel samfamilianojn, kio kongruas kun la aktualaj sciencaj konkludoj. La esperantista himno *La Espero* lirike esprimas tiun ideon.

Zamenhof estis kuracisto kaj okulisto. Mi sekvis tiun grandulon ĉar mi admiris la profundecon de liaj ideoj pri la homara frateco. Tiu frateco, kiu dum longaj jaroj fortigis lin por alfronti malfavorajn cirkonstancojn.

Aktive partoprenante someran kurson en Normandio, mi konatiĝis kun tiu, kiu estis fariĝonta mia edzino: Hélène Hachin. Plej juna el la gefratoj, ŝi loĝis en Petit-Quevilly kun la du fratoj kaj la fratino Thérèse. Tiu lasta, kiu patrine prizorgis sian fratineton, atendis la momenton, kiam ŝi liberiĝus de tiu respondeco por eniri karmelan monaĥinejon kaj plenumi sian vivon. Ŝi ĝojis pri nia geedziĝo, kiu permesis al ŝi plenumi sian destinton.

Venis tri infanoj, Bertrand, Raphaëlle kaj Régine, por beni tiun unuiĝon. Ve, la malsano de la jarcento devis forporti ameman patrinon, aktivan kaj entuziasman kunlaborantinon, post monatoj da suferado!

Kelkajn jarojn poste mi rekonstruis hejmon kun Betty, filino de kolego, vidvino, patrino de du infanoj, Marie-Christine kaj Jean-Christophe.

Sed, ve, en ĉi tiu mondo nenio estas eterna, kaj ankoraŭ alia malsano – kiu, korpe malpli suferigante ŝin, tamen trafis ŝin per pli insidaj spiritaĵoj doloroj, kaj ilin distrudis al ŝiaj gekaruloj – estis destinita same fortiri ŝin for de nia amo.

D-ro André Albault